

# Jarraporto 2020

traktota dum la landa kunveno 2021

## A. Ekstera informado

### Amaskomunikiloj

La 16an de oktobro inkluziviĝis en la ĝenerala televida regiona novaĵelsendo de NRK Rogalando tri-minuta raporto pri Esperanto kaj ties loka historio en Jørpeland apud Stavanger. Jørpeland havas Esperanto-straton post antaŭa klubagado en la 60aj jaroj. La ĵurnalisto klarigis pri tio kaj ankaŭ faris intervjuon kun Lars Sandbakk kaj koreano Heroo (Youngoung Estaban Kim) dum piedirado al loka monteto, kie ni ankaŭ prezentis la Esperantan flagon.

Krome estis kelkaj gazetaj mencioj, i.a. intervjuo kun Bjørn Øyen (Stange) okaze de la Esperanto-tago 26.07. *Hamar Arbeiderblad* 30.07. Samrilataj noticoj aperis en *Romerikes Blad* kaj *Tønsbergs Blad* 25.07.

Aperis ankaŭ noticoj okaze de la 100- jariĝo de Astrid Mansrud en *Nordstrands Blad*, *Aftenposten* kaj *Dagsavisen* 30.04.

### Interreto

Ni havas retpaĝaron kaj retpoŝtan sistemon. Ilin administras Jardar Eggesbø Abrahamsen kaj Judith Parelle Abrahamsen. La retpaĝoj enhavas ampleksajn informojn pri Esperanto norveglingve, liston de kontaktpersonoj kaj informojn pri aĉetebla literaturo, aranĝoj ktp. Ni afiŝadas la estrarajn protokolojn de NEL tie. Krom tio la ĝisdatigoj estis maloftaj, parte pro manko de taŭgaj novaĵoj. Ankaŭ NJE havas retpaĝojn, kie publikiĝis ĉiu numero de *Inter Ni Dirite*. La paĝaro de NEL ligas al la paĝaro de NJE.

NEL havas la konton @esperantonytt ĉe *Twitter*, sed estis minimuma aktivado tie dum 2020 (du mesaĝoj). NEL estas ankaŭ en *Facebook* sed okazis nur malmulte da aktivado tie en 2020.

### Informbudoj/prelegoj

Pro la korona pandemio ne okazis informbudoj aŭ informaj prelegoj.

### Informado en la norvega

*Esperanto-nytt* unupaĝa (A4) aperis regule, trifoje dum la jaro kaj estis dissendita rete al interesiĝantoj 104 (90) kaj al NEL-inform, kaj ni afiŝis ĝin ĉe [esperanto.no/e-nytt](http://esperanto.no/e-nytt).

Ne eldoniĝis novaj broŝuroj en 2020, sed la estraro preparis novan ĝeneralan broŝuron kiu pretiĝos en 2021. Ĝi estos plurkolora kaj celita por elprintado kun lokaj adaptoj. Ni ankoraŭ havas iomete da broŝuro *Oppdag esperanto* de 2012.

## **Informpetoj**

Venis kelkaj malmultaj informpetoj dum 2020, kaj rete kaj ĉe porde en la oficejo en Oslo.

## **B. Instruado**

### **Ĉeestaj kursoj**

Henrik Håndlykken aranĝis enkondukan kurson en Skien la 25-an kaj 26-an de aprilo. La kurson partoprenis du junuloj.

### **Interretaj kursoj**

En la TTT-ejo estas ligiloj al la plej aktualaj kursoj, lernu.net kaj duolingo.com. Iuj certe lernas memstare per tiuj kursoj, sed ni ne scias kiom, ĉar nur kelkaj turnas sin al NEL aŭ loka klubo.

### **Ekzamenoj**

La estraro proponas KER-ekzamenojn por tiuj, kiuj volas havi ekzamenon.

### **Instruantoj**

Neniu membro petis subtenon por lerni instruadon en 2020.

### **Faksekcio de instruistoj**

La faksekcio daŭre malaktivis. La peradon de la norvegaj ILEI-kotizoj kaj la mastrumadon de la konto de la instruista sekcio prizorgas la kasisto de NEL kaj la oficejo.

## **C. Kontakto kun la kluboj kaj membroj**

### **Landa Kongreso**

En 2020 ne okazis landa kongreso, ĝi laŭtradicie organiziĝas ĉiun duan jaron..

### **Seminario por membroj**

NEL aranĝis virtualan seminarion sabaton la 21an de novembro pere de la konferenca programo *Zoom*. Pri la temo: "Renovigo kaj plijunigo de la skandinava komunumo" ni invitis gastprelegi Stefan MacGill, komisiiton de UEA pri landa agado. Krom lia prelego la gvidantoj de la nordiaj landoj prezentis la agadon en siaj landoj kaj okazis ankaŭ diskutoj pri tri temoj. Aliĝis 37 homoj, ĉ. la duono el Norvegio, la ceteraj plejparte el Danio kaj Svedio, sed ankaŭ el sep aliaj landoj. Kvankam la seminario daŭris nur du horojn, ĝi rolis en la plurjara serio de UEA, Aktivula Maturigo (AMo) kiel n-ro 69.

### **Norvega Esperantisto**

Ankaŭ dum 2020 nia membrogazeto *Norvega Esperantisto* donadis al la membroj la plej gravajn informojn. Eldoniĝis 6 numeroj, 2 havis 16 paĝojn, la aliaj 12 kaj 24 – inkl. de *Inter Ni Dirite* (la junularaj paĝoj) en 3 numeroj. Redaktis Douglas

Draper; enpaĝigis Douglas Draper kaj Judith Parelle Abrahamsen; presis Land trykkeri, Dokka (je tre favora prezo).

Krom al la membroj ni sendis *Norvega Esperantisto* al kelkaj norvegaj kaj eksterlandaj pagantaj abonantoj kaj donacabonantoj; ni sendis ĝin senpage al kelkaj norvegaj kaj ĉ. 25 (25) eksterlandaj ricevantoj (inter ili estraranoj de UEA), kaj interŝanĝe al ĉ. 20 (20) eksterlandaj eldonantoj de Esperantaj periodaĵoj. Cetere ni sendis la gazeton papere kaj senpage al la najbaraj landaj asocioj kaj al tiuj de kelkaj malriĉaj landoj.

Tio estas sume iom sub la minimuma nombro (200) por havi rabaton pri la sendo. Ni suplementis sendante al norvegaj informpetintoj kaj interŝanĝe al aliaj landaj organizoj. Ekde n-ro 6/2020 ni havas interkonsenton kun SEF laŭ kiu ni dissendas la svedan *La Espero* rete al NEL-inform, dum ili simile dissendas al siaj membroj.

### **Retlistoj**

La retroŝtliston por membroj, *NEL-inform*, administris Jardar E. Abrahamsen tra servilo ĉe *Nettverksgruppa*. Per ĝi estas atingeblaj 58 membroj (58), kaj sendiĝis 58 mesaĝoj (43).

La diskutlisto *NEL-diskut* estas malferma por ĉiuj. En 2020 membris tie 37 (37) personoj, inter ili kelkaj eksterlandanoj. La liston administris Jardar Eggesbø Abrahamsen. Sendiĝis 2 mesaĝoj (1).

### **Lokaj kluboj**

Laŭstatutajn jarraportojn pri 2020 sendis la kluboj de Tromsø, Trondheim kaj Oslo.

Nur la Oslo-klubo eldonas propran kluban bultenon. La kluboj de Oslo, Trondheim kaj Tromsø havas retpaĝojn en TTT.

La klubo en Tromsø kunvenis 8 fojojn tra la jaro, el kiuj unufoje virtuale. Interalie vizitis la klubon esperantistoj el Usono, Maroko kaj Koreio.

La klubo en Trondheim kunvenis dufoje fizike kaj trifoje rete, interalie por jarkunveno kaj ĝardena festo. Ne okazis kursoj aŭ alia alekstera agado en 2020, sed ja regulaj retaj kunvenoj kun esperantistoj en la ĝemelurbo Darmstadt.

En Oslo ordinaraj kunvenoj okazis la unuan mardon kaj la trian lundon de la monato. Tamen plurajn fojojn ili ne povis okazi, ne nur en julio kaj aŭgusto, pro la pandemio kovim-19.

Okazis 14 (18) lund/mardaj kunvenoj kun anoncitaj temoj. Unu el ili estis studkunveno pri teksto kun ekzercoj kaj en du kunvenoj partoprenis pluraj eksterlandaj gastoj. Kiel kutime la unua marta estis la jarkunveno. Plurajn aliajn fojojn kelkaj membroj klopodis interkontaktiĝi per *Zoom*, kun varia sukceso.

La klubo ricevis kiel ŝtatan subvencion por 2020 laŭ la studplano "Esperanto – konversasjon" tra nia studasocio *Studieforbundet næring og samfunn*: 5020 kr (2100).

En Bergen estis unufoja kunveno en la urba biblioteko en februaro, sed pro la korona pandemio nuliĝis la posta aktivado.

La komunaj societoj de Bryne kaj Stavanger/Sandnes en Rogalando ne aranĝis klubkunvenojn dum 2020 pro la pandemio. Kelkaj membroj tamen agadis kaj inter si mem aŭ kune kun aliaj esperantistoj. Ekzemploj estis la televida intervjuo en NRK, kaj vojaĝo al monto Trolltunga apud Odda. Ni ankaŭ tenis kaj iom fortigis la kontakton kun internaciaj geamikoj.

La aliaj kluboj ne raportis iun agadon.

### **NEL-estraraj protokoloj**

La estraraj protokoloj afiŝiĝis en niaj retpaĝoj, kaj la membrogazeto peris la plej gravajn punktojn.

## **Ĉ. Aliaj projektoj kaj aplikoj**

### **Vortara projekto**

Ne estis aktiveco en 2020.

Haveblas provizora listo de vortoj kiuj mankas en la norvega–Esperanto vortaro de 1963. 16 p. A5.

## **D. Administrado**

### **Retservilo**

La retpaĝaro kaj retroŝta sistemo situas ĉe la firmao Initio Medielab en Trondheim. Dum 2020 Judith Parelle Abrahamsen movis la retpaĝaron kaj ties enhavon al teĥnike ĝisdata servilo.

### **La oficejo**

En la oficejo en Oslo deĵoris ĉefe Douglas Draper, kiu ankaŭ respondecis pri arĥivado. La estraranoj troviĝas tra la tuta lando, kaj preskaŭ la tuta komunikado inter ili okazis per Interreto. Okazis 8 (10) retaj estraraj interkonsiliĝoj.

### **Teknikaĵoj**

Herman Ranes en Trondheim asistis la oficejon en Oslo pri komputilaj kaj telefonaj praktikaĵoj, zorgante pri diversaj agordoj laŭbezzone.

### **La Esperanto-Domo (Esperantonia)**

NEL posedas duonon de Esperantonia, kaj la Oslo-klubo posedas same multe. La posedantoj dividas inter si la loĝkostojn. Ekde 2008 la Oslo-klubo ricevas 60% el la luig-enspezoj. Ne estis tiaj enspezoj en 2020.

### **Membrostatistiko por NEL en 2019**

En 2020 NEL havis 6 aliĝintajn klubojn (6).

La membronombroj estis en 2020 (2019):

Bergen	<b>10</b>	(10)
Bryne	<b>7</b>	(8)
Oslo	<b>47</b>	(46)
Stavanger	<b>3</b>	(4)
Tromsø	<b>12</b>	(12)
Trondheim	<b>11</b>	(10)
<hr/>		
Kluboj sume	<b>90</b>	(90)
Rektaj	<b>29</b>	(30)___
<hr/>		
Membroj entute	<b>119</b>	(120)

Membroj laŭ kategorio:

*Klubanoj:*

Ordinaraj	<b>53</b>	(55)
Junulaj	<b>11</b>	(10)
Samdomaj	<b>7</b>	(7)
Dumvivaj	<b>19</b>	(19)

*Rektaj:*

Ordinaraj	<b>20</b>	(21)
Junulaj	<b>3</b>	(3)
Samdomaj	<b>0</b>	(0)
Dumvivaj	<b>6</b>	(6)

## Ekonomio

La spezokonto de NEL en 2020 estas denove negativa, sed same kiel en 2017 kaj 2018, temas nur pri kelkaj miloj da kronoj, kaj tiu malprofito ne endanĝerigas la financon estontecon de la asocio, ĉar la propra kapitalo de NEL sufiĉe altas. Elspezoj en 2020 havis normalan nivelon, sed enspezoj iom pli malaltis ol kutime: donacoj ne tiom abundis kiel en 2019, kaj la kunvenĉambron en Oslo tute ne eblis luigi pro la kronvirusaj reguloj.

La komparo de jarkalkuloj 2017-2020 montras konstantan malkresketon de la membrototizoj kaj de la vendoj kaj abonoj jaron post jaro. Tiu evoluo en si mem estas pli maltrankviliga ol la kelkmilkrona malprofito.

## Legaco Rolf Uhlen

La legaco Uhlen havas paĝon en nia retejo [www.esperanto.no](http://www.esperanto.no).

Ĝi ne donis subvencion en 2020.

La kapitalo je la fino de 2020 estis 1 044 909 kr. (Netuŝebla: 710 911 kr.)

Reprezentantoj de NEL:

- Herman Ranæs (prez.), kun anstataŭanto Leif Arne Storset
- Judith Parelie Abrahamsen (kas.), kun anstataŭanto Marianne Lund

Ĉar Norvega Esperantista **Fervojista** Asocio (NEFA) en la realo malfondiĝis (pro mankantaj membroj), la reprezentantoj de NEL pretigis novan statuton de la legaco, kiun la estraro de NEL aprobis (la 6an de majo 2019). En 2020 peto pri akcepto de la nova statuto estis sendita al *Stiftelsestilsynet* por aprobo. [2021: *Stiftingstilsynet* aprobis la novan statuton la 20an de januaro 2021. Ekde tiu dato neniu referenco al NEFA plu estas en la statuto.]

### **Norvega Junularo Esperantista**

Parte pro la fakto ke la membroj kaj estraranoj loĝas tre malproksime, parte pro la fakto ke la kronviruso obstrukcis la eblecojn por havi kunvenojn, 2020 iĝis tre malaktiva jaro por NJE. Aranĝiĝis unu reta kunveno (“Mojosa Vespero”) kun kelkaj partoprenantoj el Norvegio kaj eksterlandanoj. Krom tio, aperis Inter ni dirite trifoje dum 2020.

La estaranoj post elektoj en la landa kunveno en 2019 estas la jenaj:

- prezidanto: Vidar Benjamin Skretting
- vicprezidanto: Henrik Håndlykken
- kasisto: Jacob Grevstad

Jacob Grevstad reprezentas NJE-on en TEJO kiel Komitatano A.

### **Biblioteko**

En Esperantonia ni havis en 2020 ĉirkaŭ 30 bretometrojn da libroj kaj kajeroj. Al la biblioteko aldoniĝis ĉ. 1,2 bretometrojn de libroj hereditaj de Anne Karin Bondhus. Centra responsulo pri la Biblioteko estas Douglas Draper. Librojn kiujn ni havas 2- aŭ pli-ekzemplere ni ofertas per [www.esperanto.no](http://www.esperanto.no) → movado → biblioteko por po 20 kr. Preskaŭ neniu aĉetis.

Granda kolekto da Esperantolibroj troviĝas ankaŭ en la Nacia Biblioteko de Norvegio en Mo i Rana, de kie oni senpage povas prunti per ajna loka biblioteko.

Parto de la postlasitaj libroj de Anne Karin Bondhus estis forsendata al interesitaj Esperanto-grupoj en Afriko. NEL kovris la afrankon.

### **Internacia organizo**

Komitatano A de UEA estas Kjell Peder Hoff.

Ĉefdelegito de UEA, Agnar Fitjar, peris informon de UEA pri **25** (25) membroj de NEL kiuj estis ankaŭ individuaj membroj de UEA en 2020, laŭ kategorioj jenaj:

Membro-Abonanto	<b>9</b> (9)
Membro Baza (antaŭe kun Jarlibro aŭ kun Gvidlibro)	<b>11</b> (12)
Dumviva Membro	<b>5</b> (4)

---

Aliaj membrokategorioj:

Societo Zamenhof	2 (4)
Patrono de TEJO	0 (1)
Dumviva Patrono de TEJO	1 (1)

### **Universala Kongreso**

6 (8) norvegoj aliĝis al la 105-a Universala Kongreso, kiu pro la pandemio estis organizita kiel virtuala kongreso.

### **Kunlaboro kun ne-Esperantaj organizoj**

NEL estas membro de la studasocio *Næring og samfunn* kaj membro de *FN-sambandet*.

### **La estraro de NEL estis post la landa kunveno en 2019:**

- prezidanto: Mario Machlik
- vicprezidanto: Jardar Eggesbø Abrahamsen
- sekretario: Bård Hekland
- kasisto: Claude Rouget
- estrarano: Lars Sandbakk
- anstataŭanto 1: Amelie Matt
- anstataŭanto 2: Herman Ranæs

## **E. Resumo**

2020 estis jaro escepta por pli-malpli la tuta mondo. La pandemio de kovim-19 malebligis fizike ĉeeston kaj nialande kaj internaciskale. La Universalan Kongreson anstataŭis Virtuala Kongreso, kaj aliaj aranĝoj aŭ nuliĝis aŭ transiris al surreta surogato. Tio kaŭzis multajn problemojn, sed ne nur: La enretigado ebligis ankaŭ partoprenon de homoj dise loĝantaj tra la mondo, kiuj ne sukcesas ordinare ĉeesti, ĉu pro monaj, tempaj aŭ aliaj limigoj. Ankaŭ la NEL-anoj vole-nevole kapabliĝis pri diversaj teĥnologioj, kiujn eblos utiligi ankaŭ post-pandemie.

Pozitiva paŝo estis nia reta seminario en novembro, kun bona partopreno ankaŭ de la aliaj nordiaj landoj. Espereble ni sukcesos krei realan kaj reciproke fortigan kunlaboron inter la nordiaj landaj asocioj kaj tiel kontribui al pli vigla Esperanta komunumo en nia mondangulo. Alia pozitiva paŝeto estis finfarado de nova kaj modernaspekta broŝuro por disdonado, kiam tio denove eblos.

Por 2021 estas planata virtuala kongreso, kiu espereble sukcesos altiri ankaŭ membrojn, kiuj ne pretus fari longan kaj koston vojaĝon al semajnfina Landa Norvega Esperantisto 2/2021

Kongreso. Tamen, ni ĉiuj sopiras al pli normala stato, en kiu ankaŭ eblas tradiciaj renkontiĝoj, ĉu lokaj, naciaj aŭ internaciaj. Ni esperu, ke tio denove estu ebla ene de la jaro 2021.

La 18-an de marto 2021

**La Liga Estraro**

Mario Machlik

Jardar Eggesbø Abrahamsen, Bård Hekland, Amelie Matt,

Herman Ranes, Claude Rouget, Lars Sandbakk

---

## **Legaco Uhlen**

ĈU VI SCIIS ke ekzistas fondaĵo kiu povas subvencii esperantistojn en Norvegio? Legaco Uhlen povas asigni monsubtenon al NEL-membroj por Esperanto-agado kaj okazaĵoj enlande kaj eksterlande. Vojaĝ-subvencioj esence kovru la plej malmultekostan vojaĝmanieron tien kaj reen, sed la legaca estraro povas konsideri aliajn itinerojn. Demandu al ni pri detaloj! Ni aparte bonvenigas petojn de junuloj!

Sendu peton aŭ demandon retpoŝte al <uhlen@esperanto.no>.

Petilo estas elŝutebla ĉe [www.esperanto.no/uhlen](http://www.esperanto.no/uhlen) . La legacaj statutoj ankaŭ troveblas tie.

La legaca estraro

*VISSTE DU at det finst eit fond som kan gje økonomisk stønad til esperantistar i Noreg?*

*Rolf Uhlens legat kan løyva midlar til NEL-medlemer for ymse esperanto-tiltak og tilskippingar innanlands og utanlands. Ev. reisestønad skal i utgangspunktet avgrensast til å dekkja rimelegaste reisemåten fram og attende, men legatstyret kan vurdera andre reisedetaljar. Spør oss om du lurar på noko! Me oppmodar serleg ungdom til å søkja!*

*Søknad eller spørsmål skal sendast på e-post til [uhlen@esperanto.no](mailto:uhlen@esperanto.no) .*

.

*Søknadsskjema kan lastast ned frå [www.esperanto.no/uhlen](http://www.esperanto.no/uhlen) . Der finst òg føresegnene.*

*Legatstyret*



## Spezokonto de Norvega Esperanto-Ligo

**2019**

**2020**

<b>Rimedo</b>			<i>Noto</i>
Membrokotizoj	33 637	32 632	
Uzo de kunvenejo (Osloa klubo)	15 200	15 200	
Donacoj (specifcelaj k. ĝeneralaj)	17 580	5 020	1
Luigo de kunvenejo (al ne-esp.)	1 280	0	
Vendoj kaj abonoj	967	906	
Aliaj enspezoj	416	0	
<b>Sumo de la ordinaraĵ rimedoj</b>	<b>69 080</b>	<b>53 758</b>	
<b>Kostoj</b>			
Oficejo/domo (lupago, elektro, ktp)	38 340	32 132	2
Revuo (presado kaj sendado)	12 964	14 758	3
Kotizoj plupagataj al kluboj	6 740	6 098	
Subteno al Norvega Junularo Esp.	2 500	2 500	
Kotizo al UEA (aligitaj membroj)	1 443	1 211	
Kotizoj al eksteraj organizaĵoj	2 250	2 500	
Aliaj kostoj	4 440	6 997	4
<b>Sumo de la ordinaraĵ kostoj</b>	<b>68 677</b>	<b>66 196</b>	
Bankaj kaj financaj (mal)kostoj	16 793	8 947	5
Eksterordinaraĵ enspezoj	4 868		
<b>Saldo spezoj</b>	<b>22 064</b>	<b>-3 491</b>	

*Noto*

- 1 Donaco al domkonto: kr 5 000
- 2 Luo: kr 23 498; elektro: kr 3 755; asekuro: kr 2 000; domimposto: kr 2 183
- 3 Presado: kr 4 725; sendado: kr 10 033
- 4 Flegado de tombo de Haldor Midthus: kr 1 550; reklammaterialo kr 1 980
- 5 Skagen vekst kaj høyrente kreskis je kr 8 705.

**Bilancio de NEL je 31-a de decembro****2019****2020****Aktivoj***Nota*

Oficejo (simbola valoro)	97 667	97 667
Akcioj (Skagen-fondaĵo)	206 777	215 482
Debitoroj/malŝuldoj	14 080	0
Norvega ILEI-sekcio	11 238	11 235
Kontoj ĉe UEA kaj FEL	5 500	4 506
Aliaj bankkontoj + kaso	63 621	56 201
<b>Sumo de la aktivoj</b>	<b>398 883</b>	<b>385 091</b>

**Pasivoj**

Ĝenerala kapitalo	240 750	262 814
Saldo spezoj	22 064	-3 491
Propaganda fondaĵo	47 167	47 167
Studfondaĵo	45 344	45 344
Domkonto	23 593	23 593
Deponaĵoj de lokaj E-kluboj	14 965	9 664
Ŝuldoj (kreditoroj)	5 000	0
<b>Sumo de la pasivoj</b>	<b>398 883</b>	<b>385 091</b>

<sup>6</sup>*Nota*<sup>6</sup> En 2020 tuta sumo koncernis E-klubon de Bergen